

Speciala
Kongresa
Numero

Antaŭkongreso en Brno
Kongreso de blinduloj
Infana Kongreseto
Junulara programo



ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



**KONGRESURBO
DE LA 8-a KONGRESO DE ĈEA**



☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
aperas 6-foje jare. Abono 15 gld.

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato.

Membroklotizoj: A 160 Kč, B 80 Kč, (C nuligita), D 40 Kč, E 40 Kč, F 3200 Kč, G 100 Kč (Starto), eksterlandanoj 20 ECU, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 335 Kč komencantoj, 240 Kč progresintoj. Aliĝoj: Mgr. Vlasta Janáková, Smetanova 26, 541 01 Trutnov.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, poŝtkesto 1069, 111 21 Praha 1, Ĉeĥio

IĈO de ĈEA: 00 44 30 34

Banko-konto de ĈEA: 3330-021/0100, Komerční banka, Praha 2

Komitato de ĈEA (ĝis novembro 1996):
Prezidanto: Ing. Vlastimil Kočvara, Ant. Sovy 10, 745 05 Opava

Vicprezidanto: Doc. Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 02.9912201, fakso 02.9912126

Vicprezidanto-kasisto: Pavel Polnický, Lesní 150/IV, 290 01 Poděbrady, tel. 0324.5651

Sekretario: Květa Hubnová, Esperanto, p.s. 1069, 111 21 Praha 1

Komitatano: Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 05.4323 3047

Komitatano: Vladislav Hasala, pošt. př. 34, 696 62 Strážnice, tel. 0631/942507, fakso 0631/2079

Komitatano: Mgr. Vlasta Janáková, Smetanova 26, 541 01 Trutnov, tel. 0439.4170

Kontisto: Jiří Patera, U Ryšánky 1534, 147 00 Praha, tel. 02.460162

Ĉefdelegito de UEA: Stanislava Chrdlová, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 02.9912201, fakso 02.9912126

Redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05.4724 0690 (post 19a horo)

Invito al Havířov

La 8-a kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio efektiviĝos de la 29-a de novembro ĝis la 1-a de decembro 1996 en la nordmoravia urbo Havířov.

La aliĝilojn vi trovos en la mezo de tiu ĉi numero de Starto.

Dum la renkontiĝo la klubo de esperantistoj en Havířov solenos sian kvardekjarigon.

Se vi persone ne povos veni, la klubanoj estos dankemaj por bildkartoj kun salutoj de geesperantistoj el la tuta mondo.

Bonvolu sendi ilin al unu el la sekvantaj adresoj:

- Esperanto-Klubo, kulturdomo de Leoš Janáček, Dlouhá třída, 736 01 Havířov-Město

- Esperanto-klubo, kulturdomo de Petr Bezruč, Hlavní třída, 736 01 Havířov-Město

Sinceran dankon kaj ĝis revido en Havířov

Zdeněk Heiser
prezidanto de la klubo

DONACIOJ al ĈEA

J.Šebela, Třebíč	200,-
O.Ungerová, Neratovice	1000,-
A. Vozáková, Slavičín	500,-
M.Bartovská, Frýdek-Místek	1200,-
M. Picková, Brno	1200,-
B. Zubová, Lysá n.L.	700,-
Vondrouškoví, Brno	400,-
M. Bartovská, Frýdek-Místek	600,-
entute	5.800,-

Al ĉiuj koran dankon!

KONGRESAJ POST-EŬOJ

Mesaĝo de Boutros Boutros-Ghali, Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj

Mi ĝojas saluti la partoprenantojn de la 81-a Universala Kongreso de Esperanto. Venante el tiom da diversaj landoj, vi faras apartan impreson ĉe ni en Unuiĝintaj Nacioj pri via kapablo kunveni kaj debati sen interpretistoj.

Dum Unuiĝintaj Nacioj eniras sian duan jarkvindekon, la neregistaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun UN, kiel Universala Esperanto-Asocio, fariĝas ĉiam pli gravaj por la laboro de la Organizaĵo. La lerto, sperto kaj sindediĉo de la multaj NRO-aktivuloj donas esencan kontribuon en vasta aro da kampoj. Via Asocio jam elmontris sian volon plivastigi la senperan kaj egalecan partoprenon de civitanoj en la laboro de Unuiĝintaj Nacioj kaj plibonigi la komunikadon kaj interkompreniĝon inter la nacioj. Tiujn celojn mi tutkore subtenas.

Mi sendas miajn bondezirojn por stimula kaj fruktodona kongreso.

Mesaĝo de Federico Mayor, Ĝenerala Direktoro de Unesko

Estas por mi granda plezuro etendi korajn salutojn al la partoprenantoj de la

81-a Universala Kongreso de Esperanto, okazanta en la historia urbo Prago. Kiel vi scias, Unesko donas apartan gravecon al sia kunlaboro kun internaciaj kaj naciaj neregistaraj organizaĵoj, konsekvence kun sia strebado al la celoj de internaciaj solidareco kaj interkompreno. Konsidere al tio, ni taksas valora nian longdaŭran rilaton kun Universala Esperanto-Asocio, kiu kuraĝigas dialogon inter la popoloj de la mondo per la antaŭenigo de universala lingvo.

Unesko, kiu havas la statutan taskon helpi subteni la „fruktodonan diversecon“ de la kulturoj de la mondo, kredas, ke universaleco devas enteni plurecon. Lingvo estas, kompreneble, la vivanta koro de ĉiu kulturo, kaj tial lingvoj devas esti konservataj en la varieco de siaj formoj. Multaj el la 4000 ĝis 5000 lingvoj de la mondo - ĉiu reprezentanta unikan manieron koncepti la realon - povus malaperi tra la venonta jarcento, krom se oni konscie penas protekti ilin. Per sia *Linguapax*-projekto, Unesko estas aktive engaĝita ĉe la protekto de la lingva heredaĵo de minoritataj kulturoj, ne laste per la antaŭenigado de denasklingva instruado. La lingvoj de la mondo konsistigas universalan heredaĵon kaj devas esti konservataj - kaj por si kaj por ni.

La lingva diverseco, tamen, devas neniam servi kiel preteksto por eksterlaso kaj antaŭjuĝo. Per la antaŭenigo de komuna formo de komunikado, Univer-

sala Esperanto-Asocio helpas konstrui pontojn de interkompreno inter la popoloj kaj kulturoj de la mondo, por montri ke unueco en diverseco eblas - kaj necesas - en nia pli kaj pli interdependa mondo. Mi deziras al la Kongreso de via Asocio ĉian sukceson en ĝia laboro.

Vortoj de Miloslav kardinalo Vlk, Ĉefepiskopo de Prago

Mi salutas vin kore kaj frate ĉiujn, karaj partoprenantoj de la 81-a Universala Kongreso de Esperanto en Prago, kiun mi ne povas bedaŭrinde partopreni persone. Tial mi sendas ĉi tiun mian mesaĝon.

Antaŭ ĉio mi deziras al vi, ke vi gajnu belegajn impresojn el nia lando, Ĉeĥa Respubliko, kaj precipe el ĝia ĉefurbo.

Mi mem kiel esperantisto apogas vian grandaniman strebadon ne nur por lingva interkompreniĝo, sed ankaŭ por vera amikeco inter homoj el diversaj kulturmedioj kaj religioj. Mia episkopa devizo estas ja „Por ke ĉiuj estu unu“.

Do, mi certigas vin ĉiujn ke mi spirite restos kun vi kaj preĝos por abundaj fruktoj de via kongreso.

Mesaĝo de d-ro Louis C. Zaleski-Zamenhof

Bonvolu ricevi la tradician bonven-saluton de Zamenhof-ido. Mi tutkore deziras plenan sukceson al la 81-a

Universala Kongreso de Esperanto.

Vi kunvenas ĉi-jare en la bela urbo Prago por debati gravan kaj ege aktualan temon: ĉu kulturo estas valoro, ĉu varo? Nu, la temo kulturo estas konstante ligita al la Esperanto-movado. Ja unu el la ĉefaj taskoj de la lingvo internacia konsistas el malfermo al la mondo, kaj en alproksimigo de ĝiaj devirsspecaj kulturoj, sen ajna ĝeno al iliaj originalaj trajtoj.

Kvankam la tuja, senpripensa respondo de ĉiu idealisto al la tema demando estus: „Kulturo estas valoro“, tamen respondo pli pragmata, „Kulturo estas varo“, ne plu devas esti negative antaŭjuĝata. Ni difinu la koncernajn vortojn: *valoro* estas „kvalito estiminda“, dum *varo* estas „rezulto de (ekonomia) aktiveco.“

La varoj industriaj nun rezultas tamen grandparte el la aktiveco de maŝinoj kaj de aŭtomatoj; tial la mondo pli kaj pli suferas pro malbezono de industria aktiveco de homoj. Kial do ne orienti la homan aktivecon disponeblan al kreado de *varo kulturo*? Necesas nur ke oni bone zorgu pri la „kvalito estiminda“ de la varo tiel *kreat*a - ne *produktat*a, do ne fare de aŭtomatoj! La *varo kulturo* estu *varo valora*!

Mi bondeziras al viaj debatoj ke ili signife kontribuu al la evoluo de la kulturo, tiu plej valora riĉaĵo de la homaro, same de la nacia, ĉie ajn en la mondo, kiel ankaŭ de la internacia Esperanta kulturo, komuna bono de ĉiuj. Kaj „per laboro de la esperantoj“ tiu *varo* estu ĉefe *kulturo de paco*!

Spliteroj de la 81a UK

*

La unuan fojon en mia vivo mi partoprenis en Universala Kongreso de Esperanto, kaj mi tute ne troigas, se mi konfesos, ke mi eĉ en sonĝo ne kapablis imagi ion simile ravan. Ĉiuj homoj vidigis al mi tiel proksimaj, karaj kaj kontantaj kaj mi multe cerbumis, kial. Al tiu harmonio certe helpis eĉ la Kongresa palaco, kies situo estas tiel ideala, ke el ĝi estas ĉarma rigardo sur la tutan Pragon kun panoramo de Hradčany, kaj krome ankaŭ la belega vetero. Sed ĉefan meriton pri eksterordinare amika atmosfero havis unu-sence Esperanto.

Tiun unikan, universalan entuziasmon mi perceptis per ĉiuj sensoj. Mi dezirus posedi poetan inspiron por esti kapabla priskribi pli verve miajn sentojn - mi havis imagon, ke ĉiuj homoj estas tiel senfine feliĉaj kiel mi ...

Mi konfesas, ke ĉe la preparoj kaj paroladoj pri UK-o okazintaj dum la antaŭ kongresa tempo, mi timegis malsukceson, fiaskon, ĉar la tuta planado ŝajnis al mi terure ĥaosa, nekonkreta. Kaj dume, kvazaŭ ĉe malfermo iu sorĉa aveto eksvingus per sia sorĉvergeto - ĉio subite funkciis, ĉiuj helpantoj estis sur siaj lokoj pretaj - kaj UK-o sukcese ekveturis.

Pentri impresojn pri renkontigoj de esperantistoj, kiuj post kelkaj jaroj persone konatiĝis, estas tte superflua, ĉar ĉi ĉion ĉiu vizitanto vidis propre okule aŭ mem travivis.

Plezure mi devas priskribi impreson de neesperantisto - de nia filo - kiu laboras en akceptejo de granda Praga hotelo kaj estras fremdajn lingvojn. Pri Esperanto li ĉiam parolis malrespekte, kvankam li sciis mian entuziasmon por tiu lingvo.

Dum la kongreso li nepre ne bezonis paroli kun ni, sed en nia loĝejo li trovis nur karteton kun sciigo: „Ni estas ĉiutage en la Kongrespalaco“. Do li iris tien, sed en tiu tumulto li ne povis nin trovi. Feliĉe helpis al li s-ro D. Kočvara kaj post traire de ĉiuj etaĝoj kaj salonoj ili ĝisiris en teretaĝan manĝejon, kie ni ĝuste vespermanĝis, kaj tie ni feliĉe renkontiĝis. Kaj li tuj rakontis entuziasme, kian egan impreson faris al li la homoj kaj la atmosfero en la Kongresa palaco kaj aldiris: „Fakte, panjo, tiu Esperanto estas perfekta lingvo. Mi favoras vin.“

Mi povus ankoraŭ pli multe skribi pri belegaj travivaĵoj. Estis ankaŭ mankoj, mi scias tion, sed mi iel ne sentis tion. Pri tio eble skribos iu alia.

Helena Maudrová

*

Bonveniga servo funkciis de vendreda mateno (18.7.1996) ĝis sabata nokto en ĉiuj stacidomoj, flugejo kaj centra busstacio kaj en hoteloj. Ni direktis ĉiujn kongresanojn aŭ al kongresejo aŭ loĝejo. Kiam alveturis samtempe granda grupo, ekestis ĉe la ĝiĉeto granda tumulto. Helpema serbo volis preni valizon de sia itala amiko. Nur en hotelo ili vidis, ke ili erare kunprenis iun fremdan valizon.

Antaŭ ol ili sukcesis redoni ĝin al bonveniga servo, ni jam revenis el policofocejo, kie ni anoncis perdon de valizo de aŭstra gasto. Ĉio feliĉe finiĝis. Aŭstra gasto feliĉege nuligis sian anoncon pri ŝtelo. (Drah. Kočvara)

*

Laŭ mia opinio la plej amuza kunveno de la Universala Kongreso estis kunveno de internacia kata rondo, kiu aperis antaŭ du jaroj kaj nun jam havas aĵojn en 28 landoj. La anaron kunligas modesta revuo „Folioj de Kat-amikaro“. Prezidantino de la societo estas prestiĝa angla verkistino Marjorie Boulton.

Antaŭ kunveno de la kat-amikaro okazis kunveno de delegita reto, kiu daŭris pli longe, ol estis destinita tempo. Sinjorino Boulton simple aperis inter la pordo kaj komencis parade miaŭi. la delegitaro ekridis kaj forlasis la salonon.

Por anoj ekzistas jam faka literaturo, ekz. kiel ekkoni la staton de la kato laŭ ĝia vosto. Ni vidis ankaŭ malgrandan ekspozicion de fotografaĵoj de diversaj katoj. (Vlado Sládeček)

*

Du nekredeblaj renkontiĝoj

Mia lernanto petis min interkonsenti renkontiĝon kun sia korespondantino el Irano, ĉar li povis alveturi nur por unu tago. Iom mi timis, ĉu mi sukcesos trovi ŝin kaj telefoni al li pri loko kaj horo de la renkontiĝo. Mi demandis unuan iraninon, kiu alveturis en kvarmembra grupo - kaj nekredebla hazardo okazis: ŝi estis la serĉata persono. Tuj ni telefonis kaj post 3 tagoj ili post dujara korespondado emocie brakumis sin

reciproke sen rasaj kaj lingvaj baroj.

Membro de nia klubo kun miro trovis sian francan amikaron, kiu transloĝiĝis al Kanado kaj dum 20 jaroj silentis. Ambaŭflanke neatendita renkontiĝo kaŭzis, ke ili ĝuis kongresajn tagojn kune. Kaj rezulto estas, ke ili por 3 monatoj, ankoraŭ nunjare, vizitos ŝin en Kanado. (Drah. Kočvara)

*

Plendoj de pluraj partoprenintoj:

- Solena malfermo estis interrompita per kelkaj programeroj. El tiuj la prezentado de bulgara teatro estis nedigna por kongresa inaŭguro kaj multaj ĉeestantoj foriris.

- Informsignoj kaj indikiloj ene de kongresejo ne estis tre taŭgaj - malbone videblaj (malgrandaj literoj), oni ofte erarvagis.

- Ekserlandanoj, sed ankaŭ nialandanoj kritikis, ke ekstera propagando de la kongreso estas bagatela, nenie sentebila (bedaŭrinde ĉiu afiŝeto estas nun en Prago kare pagenda)

- Pli aĝaj kaj move handikapitaj kongresanoj ne povis trovi en la kongresejo sidlokojn por ripozi

- Higienaj kondiĉoj en inaj WC estis nesufiĉaj, daŭre mankis papero kaj paperaj viŝtukoj

- Ofte oni plendis pri longaj vicoj kaj homamaso ĉe iuj ĝiĉetoj - informservo, filatela servo. Unuflanke tio montras grandan intereson, sed aliflanke nesufiĉan nombron de helpantoj por tiuj servoj. (laŭ I-AEH)

*

Kongresaj ŝteloj. Kiom kreskis en la lastaj jaroj turismo en Prago, tiom

kreskis neeviteble ankaŭ ŝtelado, eĉ rabado, sur ĝiaj stratoj. E-istoj, ofte kun siaj kongresaj sakoj kaj ŝildoj, estis certe okulfrapaj al stelitoj. Jen unu kazo raportita en la belga E-revujo *Inter ni*: „En la metroo, praktike antaŭ niaj okuloj, oni ŝtelis de Maria ŝian monujon, kvankam ĝi estis taŭge lokita en saketo fiksita sur la antaŭo de ŝia zono. En la policejo, kien ni poste trafis, amaso da esperantistaj kongresanoj kaj eŭropaj turistoj staris en vico, ĉiuj viktimoj de la sama fi-okazaĵo.“

*

Redaktoraj spertoj pri UK

- Kvankam ni arigis ses komputilojn en la kongreskuriera kaj gazetara ĉambroj, montriĝis, ke almenaŭ du komputiloj ankoraŭ taŭgus por kongresanoj, kiuj volis enkomputiligi siajn artikolojn aŭ traduki la Manifeston de Prago en sian nacian lingvon. Ili blokis niajn komputilojn eĉ dum pluraj horoj kaj prokrastigis eldonojn de kurieraj numeroj (Pragaj Sonoriloj).

- Kontribuaĵojn de kongresanoj ni post enkomputiligo metis en koverton, en kiu post kelkaj tagoj regis kaoso. Se mi denove farus tian laboron, mi numerus ĉiun ricevitan paperon, enskribus ĝin en kajeron, en kiu mi notus aŭtoron, temon kaj tagon, al kiu ĝi ligiĝas. Ĉar mi ne faris tion kaj ankaŭ la aŭtoroj ofte forgesis mencii la tagon kaj horon, impresas Pragaj Sonoriloj iom pelmele kaj gulaŝe. Ekzemple marde venis kontribuoj pri okazintaĵoj dimanĉaj kaj lundaj kaj pri okazontaĵoj ĵaŭdaj kaj vendredaj. Nur en Starto 4/1996 mi klopodis la miksaĵon iom kombi laŭ

logiko kaj tempo.

- En nia ĉambro staris ankaŭ multobligilo, kiu faris dum la semajno pli ol cent mil kopiojn. Bedaŭrinde, apenaŭ ni komencis presi Pragajn Sonorilojn (tri mil ekzempleroj), senĉese enkuradis diversaj homoj (ofte komitataj gravuloj aŭ postmomentaj prelegontoj) kaj postulis, ke ni tuj rompu la presadon de la kuriero kaj prioritare kopiu iliajn paperojn, kiujn ili nepre tuj bezonas por sia kunsido aŭ prelego. Samtempe oni telefonis el la Informejo, kie - je ĉiuj sanktuloj! - blokigis la kuriero, ke la Informejo estas sieĝas kongresanoj, kiuj postulas la kurieron. Okazis konfliktoj inter kopiistoj kaj ĝenantoj, sed ankaŭ malaperoj de kelkaj gravaj dokumentoj, ĉar iu el la hastantoj forportis ne nur siajn kopiitajn paperojn.

- Estis momentoj, kiam mi deziris ŝlosi la pordon kaj skribi sur ĝi *eniro malpermesita*, ĉar mi povis verki aŭ entajpi eĉ ne unu artikolon sen esti almenaŭ dufoje rompata de iu, kiu uragane enkuris la ĉambron, ĉar li nepre tuj devas paroli kun la redaktoro, kvankam temis pri afero, kiun li povis trankvile surpaperigi kaj meti en nian keston ĉe la Informejo aŭ antaŭ la pordo de nia ĉambro. Tial kelkaj artikoloj eĉ perdis aŭ restis en komputilo, sed ne aperis en la kuriero, ĉar senĉesa rompado de ies laboro kaŭzas erarojn kaj forgesojn. Unu svedino nomis min malĝentila viro, ĉar mi ne tuj rompis mian laboron, kiam ŝi alparolis min. Al la ĝenanto ŝajnas, ke lia ĝeno estas bagatelo, li ja ĝenas nur por momento, sed se tia bagatelaĵo venas ĉiun kvinan

minuton, la ĝenato povas frenezigi. De tempo al tempo mi efektive forkuris el la ĉambro por vagi tra la salonoj inter la kongresanoj, por iom ĝui la kongreson (apenaŭ mi povus raporti, nenion vidante propraokule), sed ankaŭ por retrovi psikan ekvilibron kaj malice eviti novajn ĝenontojn. Kiel vera kuriero mi ĉion trankuradis, preterfluge salutante konatojn kaj revenis denove al mia komputilo. Plurfoje ĝi jam estis okupita de iu artikolverkanto, kaj mi devis atendi ĝis lia foriro, ĉar mi ne estas tiom malĝentila por iun eljeti el mia seĝo. (M. Malovec)

*

Kongresaj posteĥoj. La postkongresa vojaĝo tra tri „magiaj“ urboj PRAGO - DRESDENO - KRAKOVO estis same neforgesebla, kiel ĉiuj unuopaj programeroj de la 81-a UK. Dank' al CEDOK-agentejo ĉio funkciis perfekte kaj ni estas superplenaj de historiaĵoj, kiuj en ĉiuj tri urboj abundas (mi eĉ bedaŭris miajn kunvojaĝantojn, kiuj ĝuis ilin *antaŭkongrese - dumkongrese - postkongrese*). Sed oni ne plenumis al ni deziron resti en la hotelo VLČINA en Frendštát pod Radhoštěm pli longe ol por tranokti kaj ne ebligis almenaŭ unu tagon ĝui trankvilon kaj belecon de la Beskydy-montaro. En la programo estis envicigitaj novaj kaj novaj urbovidindaĵoj. Ni do ne povas diri: „Ni ĝuis la postkongresan vojaĝon **plen-plene**.“ Eble post ia venonta kongreso en nia lando, ĉu ... (Margit Turková)

Kiel argumentas Nobel-premiito.

Ĉeĥlingva gazeto Ekonom 38/1996 publikigis intervjuon de redaktorino Tereza Tykrová kun prof. Reinhard Selten. Post interparolo pri Nobel-premio kaj ludo-teorio ŝi demandis fine de la artikolo:

Vi alveturis en Pragon al la Universala Kongreso de Esperanto. Kial ĝuste Esperanto? Internacia lingvo jam delonge fariĝis ja la angla, kun mi vi interparolas germane...

Estas vero, ke nun ludas la gvidan rolon la angla, sed tio povas rapide ŝanĝiĝi. Post kvindek jaroj estos la centro de la monda aktivado koncentrita verŝajne en la sud-orienta Azio. La angla estas por japanoj, ĉinoj kaj aliaj loĝantoj de tiu teritorio tre peniga, Esperanto male por ili multe pli facila. Mi opinias, ke el ĉi tiu mondoparto venos fortaj impulsoj por altigi la rolon de Esperanto en la internacia komunikado. Tial mi supozas, ke ankoraŭ ne estis dirita la lasta vorto.

Do vi orientiĝas al la estonteco?

Ni esperantistoj havas tre longan perspektivon. Ni ne rezonas en jaroj, sed en jardekoj. Esperanto ekzistas jam pli ol cent jarojn, tenas sian pozicion kaj ligas kontaktojn en la tuta mondo. En mezepoko regis latino, komence de ĉi tiu jarcento la franca, nuntempe la angla, kiu scias, kian lingvon adoptos la estonteco ...

Japania bohemisto Kurusu Kei en Prago

La karavano de Tokia Esperanto-klubo al UK venigis al ni Ĉeĥoj tre estimatan gaston, s-ron Kurisu Kei, tiom karan precipe al ni ĉeĥaj esperantistoj.

Kiel bohemisto li jam preskaŭ 50 jarojn okupiĝas pri tradukado de ĉeĥaj verkoj en la japanan - neniel kaŝante, ke komence de sia tradukista kariero, kiam lia ĉeĥa ne ankoraŭ estis sufiĉa, li tradukadis ĉeĥajn verkojn el iliaj Esperantaj tradukoj. Poste jam el la ĉeĥaj originaloj, tamen kun konsulta helpo de ĉeĥaj esperantistoj.

Mia ĉeĥa eldonejo KAVA-PECH, kiu sisteme prezentas ne nur ĉeĥan literaturon en Esperanto, sed ankaŭ valorajn esperantajn tekstojn en la ĉeĥa, eldonis la verkon de Kurisu Kei (malgrandan laŭ amplekso, sed grandan laŭ enhavo) *Co mi dala česká literatura. Vyznání japonského překladatele*. (Kion donis al mi la ĉeĥa literaturo. Konfeso de japana tradukisto). La verkon skribis la aŭtoro en Esperanto, en la ĉeĥan ĝin tradukis Jaroslav Žák. Aldonitaj estas konciza vivopriskribo de la aŭtoro kaj listo de liaj tradukoj el la ĉeĥa japanen, kiuj aperis en Japanio: de 14 aŭtoroj, kaj nur de Karel Čapek 8 verkoj. Jam de tio klaras, ke la personon, kiu ĝis tia grado zorgas pri disvastigo de ĉeĥa kulturo, skribita en „malgranda“ ĉeĥa lingvo, en fora Japanio, devas ami ĉiu kultura Ĉeĥo, kaj ke ĝin devas esti ankaŭ la oficialuloj. Ke tio pravas, atestas la

programo de Kurisu Kei en Prago:

Jam dum la kongreso s-ro Kurisu, akompanata de s-roj Jaroslav Mařík, honora membro de UEA, kaj Jaroslav Žák, tradukinto de lia verko, vizitis la pragan malliberejon Pankrác, kiun li volis ekkoni por sia nova verko kaj sia daŭra intereso pri Julius Fučík. Dum la ekskursita tago, do merkrede, li vizitis familion de konataj ĉeĥaj japanologoj, gesinjoroj Hrdlička, kaj sekve, akompanata de D-ro Karel Fiala (profesoro de la ĉeĥa en Japanio nun libertempanta en Prago, krome tradukisto de la japana en la ĉeĥan), li estis akceptita en la Japania ambasadorejo flanke de ĝia kultura ataŝeo.

Ĉar viziton de Kurisu Kei uzis ankaŭ multaj oficialaj instancoj kaj personoj, lia tempo en Prago estis vere utiligita ĝis la lasta minuto. Bonvolu prijuĝi mem:

Dum la restantaj 3 tagoj en Ĉeĥio post finiĝo de la kongreso, sinjoro Kurisu Kei devis tre vigle moviĝi por povi akcepti ĉiujn invitojn: Li vizitis oficejon de Ĉeĥa-Japana Asocio en Prago, kie ĝia prezidanto s-ino Káťa Kabeláčová intervjuis lin por la organo de la asocio „Konkordo“. Kvankam ili parolis japanen, ofte estis komprenebla ankaŭ al mi (nekonanta la japanan) almenaŭ unu vorto, tamen ofte uzata: Esperanto. Sed la intervjuo ne rajtis daŭri tro longe, ĉar s-ron Kurisu jam atendis direktorino de la Departamento pri libroj kaj bibliotekoj en Ĉeĥa Ministerio pri Kulturo d-rino Sedláková, kiu akceptis s-ron Kurisu en la nomo de la libertempanta ministro pri kulturo.

Sekvis intervjuo flanke de la ĉefredaktoro de *The Prague Post* s-ro Alan Levi, tamen post tiu streĉa tago Kurisu Kei ankoraŭ restis sufiĉe freŝa kaj vigla, ke li interese alparolis esperantistojn en la praga klubo. Sekvantan tagon li estis akceptita en la Praga Kastelo de D-ro Stanislav Slavický, kiu en la prezidenta oficejo prizorgas la foran orienton. Kvankam prezidento Václav Havel ne ĉeestis, s-ro Kurisu povis ekkoni lian laborĉambron, interese ornamitan sub influo de japana kulturo per toriĵo. Post la vizito de la prezidenta oficejo atendis nin en sia oficejo d-ro Antonín Jelínek, prezidanto de Komunumo de Verkistoj, kun kiu la interparolo kaj komparo de situacio de verkistoj en Ĉeĥio kaj Japanio estis ankaŭ tre interesa. Kaj vespere aranĝis Ĉeĥa-Japana Asocio en Prago honore al la estimata gasto (Kurisur Kei estas unu de tri japanoj, kiuj estas honoraj membroj de la asocio) neformalan vespermanĝon.

Kaj ankoraŭ la lastan tagon de sia restado en Prago, jam survoje al la flughaveno, s-ro Kurisu sukcesis akcepti inviton de la posedanto de la plej granda ĉeĥa eldonejo kaj esperantisto Ivo Železný al komuna tagmanĝo kaj esti intervjuata de la redaktoro de la plej legata ĉeĥa ĵurnalo *Mladá fronta DNES* Daniel Anýž. La intervjuo aperis en MFD 7.8.1996 sub la titolo *Japoncům se líbí Válka s mloky, ale čtou i Švejka* (al japanoj plaĉas Milito kontraŭ salamandroj, sed ili legas ankaŭ Ŝvejkon).

Min, kiu akompanis sinjoron Kurisu Kei preskaŭ la tutan tempon, plej forte

impresis lia ĉiama preteco tre konvene kaj efike akcenti signifon de Esperanto por liaj vivo kaj verko, sendepende, ĉu li parolis kun amikoj, redaktoroj aŭ politikistoj. Sen ajna troigo aŭ fanatikeco, sobre kaj firme, sen allaso de ajna dubo, li faris por levo de konscio pri Esperanto en oficialaj tavoloj de nia lando vere multon.

Mi volas almenaŭ tiuforme esprimi al li dankon nome de ĉiuj ĉeĥaj esperantistoj kaj precipe deziri al li firman sanon kaj sufiĉe da energio por povi realigi ĉiujn siajn planojn kaj ankoraŭ denove reveni al nia lando, ekzemple por prezenti sian sekvantan verkon en la ĉeĥa, ĉar li, kiu tiom faris por disvastigo de ĉeĥa kulturo en Japanio, estos en Ĉeĥio sendube ĉiam varme akceptata.

Petro Chrdle

GRABOWSKI-premio al KAVA-PECH

Dum la solena fermo de la Praga UK Fondaĵo Grabowski premiis en ĉi tiu teatre jubilea jaro (antaŭ cent jaroj okazis la unua teatra prezentado en Esperanto) la aktorinojn Belka Beleva kaj Jadwiga Gibczyńska kaj la geedzojn Jerzy Fornal kaj Zofia Banet-Fornalowa. Krome ĝi atribuis subvencion al Fondaĵo Afriko pro ties dua eldono de reviziita Esperanta-suahila vortaro kaj al la eldonejo Kava-Pech. Ankaŭ Subvencio Cigno iris al vortaro, nome al la unua araba-esperanta vortaro, kio estas aparte grava, ĉar la araba apartenas al ses oficialaj lingvoj de UN.

UK sukcesis - kaj kio plu?

La kongresa febro finiĝis kaj ĉiuj zorgoj, nervostreĉoj eĉ ŝokoj jam kelkajn semajnojn apartenas al pasinteco. La kongresanoj, travivinte belan, agrablan kaj mi kredas ke ankaŭ utilan semajnon en kongresa formikejo forlasis nian ĉefurbon kun ĝia mirakla panoramo en siaj koroj kaj restis nur rememoroj. Preskaŭ senescepte bonegaj - laŭ leteroj, kiujn mi ricevas, kaj laŭ artikoloj, kiujn mi legas.

Kion tio signifas por ni, ĉeĥaj esperantistoj?

Mi akonvinke multon. Ni pruvis, ke malgraŭ ĉiuj malfavoraĵoj, kiuj trafis nian asocion en lastaj jaroj (perdo de la oficejo, falo de la membronombro, stagnado de la praga klubo kaj aliaj), ni tamen restis laborkapablaj, sciantaj kun kontentiga rezulto organizi la plej imponan tutmondan renkontiĝon, kiu en la esperantista movado ĝenerale ekzistas. Eĉ sen stabo de profesiuloj, sen ŝtata subvencio, malgraŭ antaŭaj duboj kaj malkredemo de pluraj membroj ni pruvis, ke nia enlanda movado disponas per sufiĉa kvanto da oferemaj, kapablaj kaj laboremaj esperantistoj kun kontentigaj spertoj.

En tiu ĉi momento mi volas danki al ĉiuj, kiuj iel ajn kunlaboris kaj subtenis realigon de la kongreso. Sed unuspire mi forte volas esprimi esperon, ke ne ripetiĝos situacio, kiu sekvis post la jaro 1921, kiam sukcesa 13-a UK por longe tute elĉerpis movadajn fortojn kaj la esperantista vivo dum jaroj en nia

respubliko stagnis. Male, mi kredas, ke pruvitaj kapabloj de nia enlanda movado respeguliĝos en pluraj sukcesaj estontaj agoj. Diversaj ŝancoj antaŭvidatas:

- Jam novembre efektiviĝos la 8-a kongreso de ĈEA. Kvankam ĉefe labora, ĝi povus al cetera publiko bone prezenti nian movadon.

- En malpli proksima estonteco videbliĝas la dua ĉeĥa-germana komuna kongreso, pri kiu ni jam ricevis proponon.

- Ankaŭ la ŝanĝo de jarmilo ofertas eblecon por vidiĝi, ĉar tiam estos Praha unu el oficialaj „ĉefurboj de kulturo“ en Eŭropo.

Sed ankaŭ multaj aliaj okazoj povos utiliĝi - ĉu lokaj, regionaj aŭ dulanĝaj aranĝoj kaj renkontiĝoj - ĉiuj ĉi estas same gravaj kiel la tutmondaj, ĉar tiuj spicumas nian esperantistan vivon. Abundu ili, por ke Esperanto kaj esperantistoj estu pli videblaj kaj konstante pli gravaj en la internaciaj kontaktoj!

V. Kočvara

LA SALO

Kiom valoras saŭco

Kiam ne enestas salo?

Salo nomo mia estas.

Ĉu vi scias ke mi kapablas

Bongustigi vian manĝaĵon?

Mia foresto en ĝi forigas la mangemon,

Poste malkontenton kaŭzas.

Kiom utila kaj bonega estas

Mia naskiĝo por la vivantoj!

Ĉu vi min konas?

Mi al ESPERANTO similas.

Afrikanano

ĈEĤA-ESPERANTA VORTARO informo por kunlaboremuloj

La trimembra aŭtora kolektivo Hršel - Kraft - Malovec supozas, ke la nova vortaro devas esti pli ampleksa ol la ĝisnunaj vortaroj, t.e. proksimume 1.300.000 ĝis 1.800.000 tajpsignoj (nia plej granda vortaro de fratoj Filip havas proksimume 1.070.000 tajpsignojn). La unua malneta prilaboro de la nova vortaro en aŭgusto 1996 enhavas cca 830.000 tajpsignojn, t.e. 60% de la planata verko.

La komputilan prilaboron prizorgas ĉefe Karel Kraft (Županovice 49, 262 15 Borotice), kiu supozas fini la laboron en marto 1997. Al tiuj, kiuj interesiĝos pri kunlaboro, li sendos malnetajn paĝojn, aktuale prilaboratajn. Post ricevo de komentoj kaj korektoj li sendos pluajn.

La eldono de la Esperanta-ĉeĥa vortaro kaŭzis perdojn al la eldoninto, do estos malfacile trovi eldononton, volontan riski similajn perdojn ĉe la ĉeĥa-esperanta vortaro. Tamen ni esperas, ke kun via helpo ankaŭ tiu problemo estos solvita. kk

Ĉeĥa kaj bohemia

Siatempe en STARTO (1985, 4-5, 30-33, 1987, 2, 20-21) oni diskutis pri la nomoj Bohemio kaj Ĉeĥio. Tiam mi provis ekspliki, ke ne temas pri sinonimoj.

Estas paradokse, ke fremdlanda esperantisto apenaŭ konfuzas la titolo prezentitajn adjektivojn, dum ĉeĥlingva samideano eĉ nuntempe ŝajnas ne plene konscii, ke la adjektivo *český* portas du malsamajn signifojn:

1. La unua rilatas al ĉeĥoj, ĉeĥa lingvo, Ĉeĥaj landoj = Ĉeĥio. Germane: *Tschechen, tschechische Sprache, Tschechische Länder = Tschechien*. France: *Tchèque, la langue tchèque, la Tchèque*. Angle: *Czech* k.t.p.

2. La dua rilatas sole al Bohemio, unu el la ĉeĥlingvaj landoj: Bohemia mezmontaro, Bohemia arbaro, Bohemia-Saksia Svislando, Bohemia masivo, Bohemiaj fratoj. Germane: *Böhmisches Mittelgebirge, Böhmerwald, Böhmisch-Sächsisches Schweiz, Böhmisches Massiv, die Böhmischem Brüder*. Simile en la franca kaj angla, ekz.: *le Massif de la Bohême, Bohemian massif* k.t.p.

Por pruvi la supran aserton, ke ĉeĥlingvaj esperantistoj „pekas“ ĉi-koncerne, mi menciuj kelkon da freŝdataĵoj:

En la libro de F. Kožík LUMO EN TENEBROJ (1992) ni legas plurloke pri Ĉeĥaj fratoj, Ĝuste oni nomas ilin Bohemiaj, ĉar ili devenas de Bohemio, same kiel Maltaj kavaliroj devenas de Malto, ne grave, kiun lingvon ili parolas.

En DUA BULTENO de la 81-a UK ni legas sur p. 13 pri Okcident-ĉeĥiaj banurboj, sed sur p. 14 pri Sud-Bohemiaj pejzaĝoj (prave) kaj pri Suda Ĉeĥio (malprave). Jen kiel la redakto lamiis ...

En STARTO (1996, 3, 18) figuras Ĉeĥa paradizo, kvankam temas pri Bohemia paradizo.

Ĉu ne decus evitadi ĉi-specajn ĉeĥismojn, ĉar ili iomete memorigus pri la frazo „Donu al mi ĉambron!“ anstataŭ „Ne ĝenu min!“

J. Kavka

Vážení přátelé,

v souladu s čl. IV. odst. 1, Stanov Českého esperantského svazu svolává výbor svazu 8. sjezd Českého esperantského svazu, který se bude konat v Havířově ve dnech 29. 11. až 1. 12. 1996.

Sjezd se koná ve spolupráci s místním Kulturním střediskem u příležitosti 40. výročí založení esperantského klubu v Havířově.

- S právem hlasovacím se může sjezdu zúčastnit každý člen ČES, nečlenové jako hosté.
- Podrobný program a sjezdové materiály obdrží každý účastník při prezentaci

Místo konání:

Společenský dům, Dlouhá třída

Program:

29.11.1996 (pátek) - prezentace v budově sjezdu od 16 hod, přátelské posezení od 18 do 22 hod

30.11.1996 (sobota) - 9.30 jednání sjezdu, od 19 hod kulturní program a společenská zábava

1.12.1996 (neděle) - výlet do Ostravy, procházka městem

Ubytování a stravování:

- studentská ubytovna - za 115,- Kč včetně snídaně (jedna noc)
- hotel FORMULE - 1 lůžkový pokoj - Kč 410,- vč. snídaně (jedna noc)
- 2 lůžkový pokoj - Kč 570,- (jedno lůžko 285,- Kč)
- stravování (oběd v ceně cca 65,- Kč a večeře cca 40,- Kč) bude zajištěno v místě konání sjezdu podle předběžně objednaných, placení bude provedeno na místě

Účastnické poplatky

Odeslání přihlášky do termínu 10.11.1996 (rozhoduje poštovní razítko)

člen ČES	Kč 100,-	nečlen	Kč 200,-
----------	----------	--------	----------

Odeslání přihlášky po termínu 10.11.1996

člen ČES	Kč 200,-	nečlen	Kč 300,-
----------	----------	--------	----------

Za člena ČES je považován každý, kdo má do 10.11.1996 uhrazen členský příspěvek na r. 1996.

Čestní členové bez poplatku

Přihláška

Příloženou přihlášku odešlete v uvedeném termínu na adresu:

Zdeněk Heiser, Na nábreží 45/25, 736 01 Havířov.

Přihlášení účastníci obdrží složenku na úhradu poplatků. Potvrzení o úhradě předloží účastníci na místě.

Podrobnější informace, dotazy ap. Věra Podhradská, tel. 05/43233047 po 19 hod.

Ing. Vlastimil Kočvara

předseda ČES

POZN.: PRO URYCHLENÍ PŘIHLÁŠEK POUŽIJTE SLOŽENKU VLOŽENOU DO ČÍSLA

Zde si pro svou potřebu poznačte, jaké služby jste si objednali na přihlášce a jakou částku máte zaplatit:

Ubytování a program:

- | | | | | |
|----|--|--------------|---------------------|--|
| a) | Ubytovna | - à 115,- Kč | 29.11. ^x | 30.11. ^x |
| b) | Hotel | - à 410,- Kč | 29.11. ^x | 30.11. ^x jednolůžkový pokoj |
| | | à 570,- Kč | 29.11. ^x | 30.11. ^x dvoulůžkový pokoj |
| c) | Mám zájem o oběd ^x , večeři ^x v sobotu
(nezapočítávejte do úhrady, platí se hotově) | | | |
| d) | Výlet Ostrava ^x - s návštěvou hornického muzea - cena výletu Kč 80,-
(návrat v 15 hod) | | | |
| e) | Procházka městem Havířovem - bez poplatku | | | |
| f) | Beseda v klubovně EK Havířov | | | |

^x Požadované zakroužkujte

celkem hradím:

Přihláška

na 8. sjezd ČES, který se koná ve dnech 29. 11., 30. 11. a 1. 12. 1996 v Havířově.

Jméno a příjmení:

datum narození: čís. OP

bydliště:

člen EK, sekce

Ubytování a program:

- | | | | | |
|----|--|--------------|---------------------|--|
| a) | Ubytovna | - à 115,- Kč | 29.11. ^x | 30.11. ^x |
| b) | Hotel | - à 410,- Kč | 29.11. ^x | 30.11. ^x jednolůžkový pokoj |
| | | à 570,- Kč | 29.11. ^x | 30.11. ^x dvoulůžkový pokoj |
| c) | Mám zájem o oběd ^x , večeři ^x v sobotu
(nezapočítávejte do úhrady, platí se hotově) | | | |
| d) | Výlet Ostrava ^x - s návštěvou hornického muzea - cena výletu Kč 80,-
(návrat v 15 hod) | | | |
| e) | Procházka městem Havířovem - bez poplatku | | | |
| f) | Beseda v klubovně EK Havířov | | | |

^x Požadované zakroužkujte

celkem hradím:

Datum:

Podpis:

Přihlášku zašlete do 10.11.1996 na adresu Zdeněk Heiser, Na nábreží 45/25, 736 01 Havířov. Obdržíte složenku na zaplacení, jejímž ústřížkem se prokážete při prezentaci na místě konání sjezdu (SLOŽENKA JE VLOŽENA DO ČÍSLA).

Přihlašuji se do diskuse na sjezdu na téma:

Moje připomínky k práci svazu, sekcí, kroužků:

Esperanto kaj ĉeĥaj blinduloj

Ĝenerale oni povas diri, ke ankaŭ la ĉeĥaj geblinduloj baldaŭ ekkonis, kian signifon por ili havas la nove kreita lingvo. Ni rajtas supozi, ke ili lernis ĝin jam en la komenco de nia jarcento. Bedaŭrinde mi ne trovis dokumentojn pri tio.

La scio pri la internacia lingvo inter ĉeĥaj nevidantoj fakte disvastiĝis nur post la jaro 1917, kiam ekestis ebleco produkti ĉeĥajn publikaĵojn en brajla skribo. Ĉefajn meritojn pri tio havas sendube la nevidanta instruisto, muzikkomponisto kaj esperantisto, Karel Emanuel Macan.

Kiel instruisto de soldatoj, blindiĝintaj en la Unua mondmilito, li baldaŭ konsciĝis pri bezono de presitaj materialoj en porblindula punkta skribo, kaj kiel esperantisto li komprenis grandan signifon de la internacia lingvo por nevidantoj. Tiam li en 1917 eldonis la unuan publikaĵon en brajlo sub la titolo Jitřenka (Aŭroro), en kiu li substrekis ankaŭ la valoron de Esperanto, kaj post tri jaroj, en 1920, li iniciatis la eldonadon de esperantlingva gazeto, ankaŭ sub la titolo Aŭroro.

En la jaro 1920 estis fondita la Societo de Ĉeĥoslovakaj Nevidantaj Esperantistoj - SOĈNE - kun filioj en kelkaj grandaj urboj en la tuta respubliko. Ĝia celo estis, disvastigi Esperanton inter nevidantoj, kaj ĝi okazigis ankaŭ multajn kulturajn aranĝojn. Krom interrompo dum la dua mondmilito la societo ekzistis ĝis la jaro

1948, kiam ĝi estis ĉesigita sub influo de politikaj cirkonstancoj.

En 1921 iniciatis ĉeĥaj nevidantaj esperantistoj kunvokon de la unua Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Pragon, kun la celo meti fundamentojn de internacia kunlaboro de nevidantoj kaj malfrue fondi ilian tutmondan organizaĵon. Tiu celo estis efektive atingita, kaj la organizaĵo, kvankam ĝi kelkfoje ŝanĝis sian nomon, ekzistas ĝis nun.

De la jaro 1925 ĝis eksplodo de la Dua mondmilito funkciis en Prago Internacia blindul-afera informejo kaj statistikejo, kiu laboris en tre modestaj kondiĉoj, sed helpis al multaj interesiĝantoj, publikaj kaj privataj.

Post mallonga postmilita periodo, kiam ŝajnis, ke la poresperanta laboro inter ĉeĥaj blinduloj povos esti plene restarigita (ree komencis aperadi la gazeto Aŭroro, denove ekfunkciis SOĈNE), post la jaro 1948 sekvis longa stagno, ĉar la nova reĝimo konsideris Esperanton kosmopolita. Nur dank' al kompreno de Ligo de Invalidoj povis aperadi Aŭroro, sed la societa agado tute ĉesis. Nur en 1957 estis eldonita lernolibro de Esperanto en punktskribo.

Novan impulson ricevis la ĉeĥa blindul-esperantista movado en 1975, kiam estis decidite peti la Ĉeĥan Esperanto-Asociion pri permeso fondi blindulsekcion. Per la decido de ĝia Ĉentra Komitato en 1976 ni ricevis la aprobon.

Nova etapo komenciĝis post la jaro 1990, kiam instruado de Esperanto estis

agnoscita de ŝtataj organoj kiel rimedo de rekapabligado de viddifektiloj. Ekde tiu tempo okazas ĉiujare unusemajnaj rekapabligaj restadoj kun instruado de Esperanto, kiuj fariĝas ĉiam pli ŝataj inter niaj vidhandikapuloj.

Ĉijare, dank' al sponsoroj, povis esti eldonitaj la lernolibro de Esperanto kaj la vortaro Esperanta-ĉeĥa.

La kongresa jaro kaj la kongreso mem estis granda impulso por nialanda porblindula E-movado, kaj ni kredas, ke ĝi ankaŭ en venontaj jaroj disvolviĝos.

J. Vychodil

Korekto en biografio de Honora
Membrino de UEA en Starto 4/1996

Mi trovis, ke la informoj pri mi estas nekompletaj kaj mi ŝatus etan korekton, ĉar ŝajnus al mi esti orgojlo, se mi kuraĝus prilabori teksan terminaron, apenaŭ ĝin ekkoninte en fabriko. Mi vivis sub la montaro Karkonoŝo, inter hejmaj teksistoj, do mi ekkonis la terminaron pli frue ol skribadon. Mia granda ĝuo estis, kiam mi povis sidi silentete apud la najbaro kaj rigardi, kiel per fadeno post fadeno „kreskas la floroj” en la teksaĵo, kutime mantuko. De la teksista lernejo min fortimigis studento, kiu senĉese pentris. Nur malfrue mi konstatis, ke tio estis lia hobbio, sed ne lerneja tasko. Eble lin influis Josef Čapek, kiu tie ankaŭ studis. Tamen la teksa fako iĝis por mi tutviva pasio. Pli poste Esperanto.

M. Bartovská

Esperanto-tago en Opava

Sabate la 21-an de septembro kunvenis trideko da esperantistoj el Ostrava-regiono en klubejo de la Sindikata klubo OKO en Opava por aŭdi kaj diskuti la temon „La Esperanta literaturo en nuntempo”. La ĉefparolon prezentis M. Malovec kaj liaj faktoplenaj informoj vekis sekvan viglan diskuton. Post tagmanĝa paŭzo la partoprenantoj komune vizitis ekspozicion „Mondo sen interpretistoj” en Landa Silezia Muzeo, kiu per tiu ĉi ekspozicio honorigis la 81-an UK-on. Fine kelkaj interesuloj transrigardis renovigitan historian memorindajon „La sveda kapelo”, kiun ĝis nun ne povis viziti pro neenireblo eĉ lokaj civitanoj.

Malgraŭ tio, ke la aranĝo ne estis tro vastskala, ĝi havis bonan publikigon, ĉar ĝi estis oficiala programero de semajna kultura festivalo „Bezručova Opava (Opava de Bezruč)”, kiun organizas la urbo Opava. Tial pri la Esperanto-tago informis ĉiuj propagandiloj eldonitaj aŭ instigitaj de la organiza komitato de la festivalo.

Simile organizataj kaj publikigataj Esperanto-aranĝoj tre bone servas al alta prestiĝo de la movado.

KOV

**Esperanto-instruistoj konferencis
Tábor 28.7. - 2.8. 1996**

Konferencon de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) en konstruaĵo de Sudbohemia Universitato en Tábor partoprenis 74 personoj el 32 landoj (Albanio, Alĝerio, Argentino, Aŭstralio, Belgio, Brazilo, Britio, Ĉeĥio, Finnlando, Francio, Ganao, Germanio, Hungario, Italio, Japanio, Jugoslavio, Kamerunio, Kanado, Kroatio, Kubo, Litovio, Madagaskaro, Macedonio, Meksikio, Nederlando, Pollando, Rusio, Slovakio, Svedio, Taĝikio, Togolando, Usono).

La konferencon partoprenis ankaŭ dek geknaboj 12-18 jaraĵ, t.n. gimnazianoj kun aparta programo: oni instruis al ili per Esperanto pri matematiko, geografio, Komenio kaj pri la ĉeĥaj lingvo kaj historio. Ĝi estas eksperimento rememoriganta iamajn latinajn lernejojn, kiam oni instruis lernobjektojn latine. Ĝi estas interesa pro tio, ke la geknaboj koncentriĝas ekz-e al la geografio kaj tute forgesas, ke ili parolas Esperante. Tiel Esperanto por ili fariĝas kvazaŭ natura lingvo, ne celo de studado. Estis kvin knaboj kaj kvin knabinoj, el Britio, Hungario, Kazahio, Pollando kaj Taĝikio. Ili trifoje prezentis al la konferencanoj sian kulturen programon kun deklamado, kantado, muzikado kaj eĉ jonglado.

En la konferenco oni prezentis fragmentojn el la video-filmo Mazi en Gondolando kaj novajn lemilojn el Usono, precipe edukajn kantojn por

infanoj. Interesaj estis ekzamenoj de Ĉemetoda kurso. Dek personoj devis Ĉemetode klarigi diversajn gramatikaĵojn, ekzemple uzadon de igi/iĝi, tiu/tio, de transitivaj kaj netransitivaj verboj, de participoj k.s.

Krom la instruaj programoj la konferenco solvis plurajn organizajn aferojn de la Ligo.

Mi interkonsentis kun la kasisto de ILEI, ke por Ĉeĥio restos la membrokotizo 100 Kč, kiel estis interkonsentite antaŭ kvar jaroj en Poprad antaŭ disfalo de Ĉeĥoslovakio. Vi povas pagi ankoraŭ por 1996, ĉar la kasisto promesis, ke li tuj aranĝos, ke vi ricevu ĉiujn ĉijarajn numerojn de Internacia Pedagogia Revuo rekte el Belgio, kie ĝi estas presata. Vi jam povas pagi ankaŭ por 1997, la kasisto B. Andreasson ligos kontaktojn kun vi kiel kun nia asocia kontisto kaj ricevos informojn pri unuopaj pagoj rekte de vi. Ekde nun ĉio jam iros glate. **Sed nepre notu, por kiu jaro aŭ jaroj vi pagas.** (Do vi povas nun pagi 100 aŭ 200 Kč).

Ĝis nun pagis nur tri personoj, sed mi fidas, ke baldaŭ pagos ankaŭ aliaj kaj ni povos fondi ĉeĥan ILEI-sekcion (necesas minimume 5 membroj).

La konferenco akceptis jenan rezolucion:

REZOLUCIO

La 30-a ILEI-Konferenco, okazinta en Tábor, Ĉeĥio, de la 27-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1996 kun 74 partoprenantoj el 32 landoj de ĉiuj kontinentoj

* diskutinte la konferencan temon „Rimedoĵ por la bona lernado kaj memlernado de Esperanto“,

* konsciante pri la minacanta pereado de malpli grandaj lingvoj kaj kulturoj; kaj
* certigante ke la instruado de Esperanto celas demokratian komunikadon, transnacion edukadon, pli efikan lingvoinstruadon, konservadon de lingvaj rajtoj kaj diverseco, kaj homan emancipiĝon,
* alvokas la edukistojn, kunlabore kun Monda Kunagado, per siaj lerniloj kaj kursoj atentigi al kulturaj, sciencaj kaj edukaj Unesko-programoj cele al paca socio tutmonda,

* petas Uneskon

a) atenti la klerigan rolon de Esperanto - la sola lingvo por ĉiu homo memlembela - por internacia kunlaboro kaj reciproka aprezado kaj protekto de ĉies kulturo,

b) helpi en la evoluigo kaj disponigo de Esperanto-lerniloj al membroj de popoloj kaj socigrupoj en malavantaĝaj situacioj.

Merkrede en du busoj la tuta konferenco vizitis la kastejon Hluboká nad Vltavou. Ni devas ankoraŭ aldoni, ke la konferencon zorge preparis la geedzoj Dvořák el Praha sub sia firmao Tilio.

Perspektivoj de Esperanto

Se post la jaro 2000 iu interesiĝos pri Esperanto, li aŭ ŝi ne trukurados librovendejojn kaj bibliotekojn en la urbo, sed simple ŝaltos sian komputilon

kaj demandas ĝin pri Esperanto. Ĉar en la komenco de la venonta jarcento (kaj jarmilo) estos la plej grava teknika komunikilo la internacia komputila reto, t.n. Interreto (angle Internet).

Kiel nun ĉiu familio posedas televidilon, post dek aŭ dudek jaroj ĉiu loĝejo posedos komputilon telefone konektitan al la Interreto. Per ĝi oni mendas varojn el grandmagazenoj, sendos leterojn al iu ajn loko de nia planedo dum kelkaj sekundoj aŭ ĉerpos informojn el grandaj bibliotekoj. Sed ne nur leteroj kaj informoj estas sendeblaj per Interreto: ankaŭ bildoj, muzikaĵoj, filmoj kaj eĉ tutaj libroj, beletraĵoj kaj fakaj, lernolibroj, vortaroj, gazetoj, ankaŭ komputilaj programoj, laboraj, instruaj kaj ludaj. Ĉio, kion oni povas tajpi per komputilo, registri per mikrofono aŭ kamerao kaj ŝanĝi al elektraĵoj impulsoj.

Tre gravas, kio estos en la reto trovebla pri la Internacia Lingvo: ĉu nenio, ĉu nur suprajaj informoj aŭ ĉu granda Esperanto-biblioteko kun nia tuta literaturo kaj gazetaro, kun lernolibroj kaj vortaroj en ĉiuj lingvoj, kun informoj pri la plej aktualaj esperantistaj aranĝoj, pri niaj organizoj ktp. Laŭ tio ĉiu interesato decidiĝos, ĉu fariĝi aŭ ne fariĝi esperantisto.

En la demokratia mondo ne eblas enkonduki la Internacian Lingvon en lernejojn per dekretoj de aŭtoritataj instancoj kaj tiamaniere perforti la tutan planedan loĝantaron. Sed per Interreto Esperanto povas disvastiĝi spontane, se nia movado ĝustatempe preparos elektronikan Esperanto-bibliotekon,

disponeblan al la tuta homaro. En la mondo, kie ses miliardoj da homoj estos reciproke konektitaj per komputiloj (ankaŭ kun ĉiuj oficejoj, entreprenoj kaj bibliotekoj), ŝanĝiĝos la stilo de la homa vivo, la maniero de internacia komunikado kaj funkciado de lingvoj.

Interreto ekzistas jam nun kaj ĝiaj servoj fariĝas ĉiam pli alireblaj eĉ al ordinaraĵ personoj. La Interreta poŝto estas malmultekosta, ĉar en ĉiu ŝtato ekzistas Interret-centroj, kaj la homoj pagas nur la lokan telefonan tarifen inter sia loĝejo kaj tiu centro, eĉ se ili sendas elektronikan poŝtaĵon al la kontraŭa flanko de la Terglobo. Tie la poŝtaĵo restas deponita ĉe la loka Interret-centro en la „leterkesto“ de la adresato. Kiam la adresato venas hejmen, li ŝaltas sian komputilon kaj rigardas, kio venis en lian „leterkeston“. Do oni povas poŝti eĉ al adresato, kiu ĝuste nun ne estas hejme.

Tiuj servoj povas helpi al nia movado ĉe distribuado de bultenoj kaj gazetoj, ankaŭ al internacia kunlaboro, ekz. ĉe kreado de fakaj terminaroj. Komputiloj helpas krei grandajn vortarojn Esperantaj-nacilingvajn, ĉar tian vortaron oni povas senĉese disvastigadi kaj kompletigadi, eĉ dum pluraj generacioj. Per la reto estos al ĉiu esperantisto (kaj ankaŭ ne-esperantisto) alireblaj ĉiuj Esperantaj libroj kaj periodaĵoj eldonitaj ekde Zamenhofaj tempoj.

Nun estas tre grave, ke esperantistoj konsciu pri tiu perspektivo kaj sisteme preparu nian lingvon por ĝiaj taskoj en la reto.

Kelkaj jam eklaboris. En Interreto

ekzistas kaj kreskas *Virtuala Esperanto-Biblioteko* de Aalen kaj *Virtuala Esperanto-Kongreso*, *Flavaj Paĝoj de Esperanto*, svedaj samideanoj preparis bazan kurson de la lingvo kaj respondojn je demando „Kio estas Esperanto?“ Ing. Pospíšil el Kladno iniciatis fondon de *Virtuala Terminologia Centro*. La reto utiligas la redakcio de EVENTOJ, la eldonejoj SEZONOJ en Jekaterinburgo kaj nia KAVA-PECH, la Esperanto-Muzeo en Vieno por Interreto preparas katologon de siaj libroj. La reto kapablas trovi ĉiujn artikolojn en naci-lingvaj ĵurnaloj, en kiuj aperis la vorto „Esperanto“ ktp.

Sed tio estas nur komenco de la longa vojo.

- mm -

Virtuala* Terminologia Centro

Virtuala Terminologia Centro celas per Interreto kunlaborigi fakulojn, kiuj ellaboras terminarojn en Esperanto, eĉ se ili mem ne havas aliron al Interreto. Tiuj, kiuj havas la eblon, povas helpi al la ceteraj havigi informojn, per projektojn de terminaroj aŭ distribui informilojn. Komunan bultenon eblas dissendi al ĉiuj aliĝintaj retanoj en la mondo per malmultekosta reta poŝto, kaj ili per normala enlanda poŝto ĝin plusendos al neretanoj.

La membroj de VTC do estos de tri kategorioj: retanoj, neretanoj kun komputilo, neretanoj sen komputilo.

VTC kolektos pretajn kaj preparatajn terminarojn en elektronika formo, informojn pri tiuj, kiuj ekzistas nur „surpapere“, referencojn kaj diskutojn pri unuopaj terminoj kaj ĉiujn aliajn utilaĵojn por la terminologia laboro.

Interesatoj povas aliĝi ĉe Ing. Jan Pospíšil, Zálužní 3092, CZ-272 01 Kladno. Je la sama adreso troviĝas ankaŭ la biblioteko de scienc-teknika sekcio de ĈEA, kies enhavon ni publikigis en Startoj 4/95, 5/95 kaj 6/95. Daŭrigon ni publikigas ĉinumere.

Gloso: *Laŭ PIV la vorto „virtuala“ signifas „ebla, sed ankoraŭ ne efektiviĝinta“, laŭ la ĉeĥa fremdvorta vortaro: „kapabla ion fari“. Ĉe la internacia komputila reto Interreto (Internet) la vorto „virtuala“ signas aranĝojn organizatajn en elektronika formo.

La blanka urbo Opava bonvenigas vin

Jen la enkonduka frazo de la nova dulingva (la angla kaj Esperanto) prospekto pri Opava, kiun eldonis la urbestro de la urbo. Kolora faldfolio enhavas krom kelkaj bildoj de la urbaj vidindaĵoj ankaŭ planon de la urbo kaj mapon de ĝia ĉirkaŭaĵo. La prospekto aperis okaze de la 81-a UK kaj ĝi bone propagandas urbon kun vigla Esperanto-klubo, kiu jam plurfoje organizis gravajn esperantistajn aranĝojn.

Bedaŭrinde, ke esperantistoj el aliaj ĉeĥaj urboj ne utiligis la mondan Pragan kongreson por simile propagandi sian

loĝlokon.

Interesuloj pri la prospekto skribu al Informa centro AVE, Tyršova 1, 746 01 Opava (almetu poŝtmarkon por respondo).

V.K.

Ni serĉas...

Por miaj lernantinoj mi bezonas 2 lernolibrojn de W. Auld „Paŝoj al la plena posedo“. Ni volonte pagos ĝin. Mia adreso: Vojtěch Tesař, Pod Makovým vrchem 480, 345 62 Holýšov

Kolekton de esperantaĵoj

mi vendos por ekspoziciaj celoj.
Stanislav Linhart, Palackého 1948,
530 02 Pardubice 2

Provu traduki

Esperantistoj ŝatas konkursi kaj traduki. Dum tradukado el la ĉeĥa oni ofte renkontas esprimojn, kies esperantigo estas malfacila kaj diskutinda. Laŭ ideo de unu legantino ni proponas al vi kelkajn ĉeĥajn frazeologiajn esprimojn.
Koukej mazat!

O co ti vlastně jde?

Jemu půjčit? Ani nápad!

Provu ilin traduki kaj sendi vian solvon al nia redakcio. Plie vi povas aldoni aliajn ĉeĥajn esprimojn, kiuj meritus Esperantan ekvivalenton.

Venontfoje ni publikigos viajn reagojn.

- mm -

Iom pri knabino Lidice el Kostariko

Antaŭ 15 jaroj kompilis helpe de Esperanto mia filino, tiutempe 17-jara studentino, ampleksan kaj sukcesplenan studaĵon pri la eksterlandaj vilaĝoj Lidice. Venis informoj ankaŭ pri monumentoj, lernejoj, stratoj, placoj kaj baptomonoj.

Februare 1987 informis nin sinjoro Carlos Salazar el Kostariko, ke li ricevis la 25-an de decembro 1986 kiel Kristnaskan donacon de sia edzino filineton, al kiu la gepatroj donis nomon Lidice.

Jaroj pasis kaj nun la feliĉa patro venis en nian landon, bedaŭrinde sen sia preskaŭ 10-jara filino. Dum la trisemajna restado li travojaĝis Bohemion kaj sian migradon finis en Opava.

Post kvin jaroj li venos denove, jam kune kun sia 15-jara filino Lidice.

Jaroslav Žák

El brazila civito Lidice

Dum vizito de Suda Ameriko estis nia prezidanto Václav Havel varme akceptita ankaŭ en vilaĝo Lidice proksime de Rio de Janeiro. Estinta vilaĝo Parada (Senpova) akceptis nomon de nia detruita vilaĝo Lidice en la jaro 1943.

En ĉi tiu civito ĉiujare vilaĝaj junuloj antaŭ festotago de sankta Jozefo krepuskiĝe amasiĝas kaj decidas, post longa kverelado, kiu el vilaĝaj junulinoj estis dum pasinta jaro la plej antipatia.

Tamburante kaj kriante ili venas al la domo de malplaĉulino, sur la koridoro ekbruligas fajron kaj alvokegas ŝin salti en la flamojn. Kompreneble ili ĉiam atendas vane - kaj tio estas fino de la ĉiujara kutimo.

Sed oni diras, ke en Lidice estas la plej agrablaj, mildaj, ĉarmaj kaj amindaj knabinoj el la tuta Brazilo.

Jaroslav Žák



Nuntempa fotoĵo
de Lidice Salazar Alvarado
el urbo San Isidro del General, Kostariko

Korespondi deziras

Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn. Mi mem interŝanĝas pri la uzitaj poŝtmarkoj de la nova Ĉeĥa Respubliko: Santiago Martin Relea, Fray Juan 25 - 6 - K, 48013 BILBAO, HISPANIO

El Esperantujo

- **Infankongresetanoj en Radio.** Radio Praha II, junulara rubriko Domino, aŭdigis 12-09-96 intervjuon kun kvar knabinoj de la 30-a Infana Kongreseto. Kurioza estis franca knabino kun ĉeĥa patrino kaj patro franca. Li parolas kun ŝi en Esperanto, la patrino ĉeĥe kaj lingvo intergeedza estas ... la hispana! Aldoniĝis nekutima kanzono pri Esperanto.

- Konsiderindan ellaboraĵon defende al Esperanto kaj moralo sendis al la revuo „Reflex“ pro la aĉa pamfleto en n-ro 34 de la redakciano J.X.Doležal la Universitato J.E.Purkyně en Ústí n.L. (la rektoro, prof. Novobilský). Ankaŭ la poeto Jiří Karen vipas akre samkiel sprite la „sinjoron gentlemanon“.

- La regiona tago de handikapuloj 21.9.1996 en Pardubice donis eblecon vidi videofilmon el la Universala kongreso. Ĉeestis 65 personoj el 25 lokoj, eĉ el Germanio kaj Kanado.

- Ústí nad Labem denove spertis (27.-29/9.1996) altnivelan arton de operkantistoj Smyčka, Kudlíková (koncertinta en Japanio) kaj la juna

Tomáš Fiala (22-jara filo de „Limonádový Joe“), flutadon de Šrutová kaj violonadon de talenta knabino. Ĉeestis 63 amikoj el Ĉeĥio, Saksio kaj Bavario. Diskutkontribuoj de Novobilský, Karen k.a. La samaj kantistoj prezentis spiritan koncerton en la evangelia „Ruĝa preĝejo“.

- **Fenomeno.** En EK Praha subite aperis nova junulo, simpatia kaj vigla, kun referaĵo en flua esperanto. Mirigas, ke li eklernis esp-on nur du monatojn antaŭ la 81-a UK, kaj en ĝi li jam aktivis en la junulara programo kaj en la internacia kanto-horo. La novbakiĝinta esperantisto, biohemiisto el Ústí n. L. kaj konanto de pluraj lingvoj, vekas esperojn de aĝuloj. Li ankaŭ venas kun jena propono:

- **Listo de prunteblaj libroj.** Multaj el vi posedas librojn en Esperanto, kiujn vi volonte pruntus al aliaj legantoj. Skribu al mi liston de viaj prunteblaj libroj, mi prilaboros ĝin komputile kaj disponigos al interesitoj. La kondiĉoj de pruntado dependos de la interkonsento inter la posedanto kaj la leganto. Sendu vian liston al adreso: Bohumil Bouzek, Hilbertova 10, 400 11 Ústí nad Labem.

- **Esperanto-klubo KD Strážničan** (poŝtkodo 36, 969 62 Strážnice, tel.: 0631/942 762) organizas sabate, la 19. 10. 1996, renkontiĝon por kolektantoj de poŝtmarkoj, moneroj, bildkartoj, glumarkoj, insignoj kaj pluraj interesaĵoj.

- **Celante diskonigi Esperanton** ĉefe al gelemantoj, ni ekspozicios pri ĝi dum la lasta semajno de ĉijara novembro en la plej vizitata publika biblioteko de Belém, ĉefurbo de la amazonia provinco

Para-o. Pro tio ni petas helpon de ĉiulandaj esperantistoj. Bonvolu sendi al ni leterojn aŭ poŝtkartojn afrankitajn per belaj poŝtmarkoj; Esperantajn filatelaĵojn, bultenojn, ĵurnalojn, gazetojn aŭ librojn (ilustritajn, turismajn, porinfanaj) kaj turismajn faldfoliojn. Klubo esperantista Zamenhof, Lar de Maria, Praça Floriano Peixoto, 33, São Braz, Belém-Pa, BR-66090-290, Brazilo.

- **14a Ĝenerala Konferenco de MEM** okazos la 17-19an de majo 1997 en Hungario en Kulturdomo „LÁNG“, Budapeŝt. La partoprenkotizo 60,- USD inkluzivas 2 tranoktadojn kaj manĝaĵojn. Aliĝo kaj pluaj informoj: E-MOVILO, Budapeŝt, Nyírpálota u. 107, H-1157, tel. 36-1-271-9510.

- **Metodika seminario por Esperanto-instruantoj** en Berlino (31.10.-03.11.1996) celas esperantistojn, kiuj jam instruas Esperanton aŭ intencas instrui. Organizas Esperanto-Jugend Brandenburg/Berlin, Chausseestr. 8, D-10115 Berlin.

- **Revuoj aboneblaj** pere de Vladislav Hasala, A. Dvořák 1, CZ-696 62 Strážnice fakso/tel./reg.: 0042/631/332 507: *Afrika Vekiĝo* (87 Kč), *Amikeca Reto* (80 Kč), *El popola Ĉinio* (430 Kč), *Eventoj* (616 Kč), *Interligilo* (60 Kč), *Juna Amiko* (125 Kč), *La dua jarcento* (120 Kč), *La Eta Gazeto* (358 Kč), *La migranto* (55 Kč), *Monato* (475 Kč), *Sennaciulo* (500 Kč), *Tutmondaj scienco kaj tekniko* (437 Kč), *Esperantisto Slovaka*.

- **La Knaboj de la Kastora Rivero** de Jaroslav Foglar aperis en Třebíč esperantigitaj de Dieter Berndt kun

ilustraĵoj de Vlastimil Toman, prezo cca 90 Kč.

- **Inoj** de František Halas en traduko de Josef Rumler kaj **Bapto de caro Vladimir** de Karel Havlíček Borovský en traduko de Tomáš Pumpr (paralele kun la originalo) estis eldonitaj de la brazila eldonejo Fonto.

- **Revuo Fonto, n-roj 189/190** publikigis premiitajn verkojn de Belartaj konkursoj de UEA, inter ili eseon de Oldřich Kníchal **La ĉeĥa literaturo en la spegulo de Esperantaj tradukoj**.

- En *El popola Ĉinio* 8/1996 aperis **Katalogo de ĉinaj eldonaĵoj en Esperanto**. Oni trovas tie 6 verkojn pri filozofio, historio kaj politiko, 9 vortarojn kaj lemolibrojn, 34 beletraĵojn, 46 verketojn por infanoj, 12 publikaĵojn pri turismo kaj sporto, kaj 10 pri medicino, scienco kaj tekniko.

- **Esperantisto Slovaka** reaperis sub redakto de Stano Marček. En la unua numero oni legas alparolojn de la nuntempa redaktoro kaj de la iama fondinto Ernesto Váňa el Dudince, leterojn de legantoj, beletran angulon kun *Puto de la amo*, artikolon pri *La mezepoka slovaka urbo Levoča kaj ĝia Majstro Paŭlo*, raportojn pri la unua slovaka AIS-sesio, pri la 12a simpozio de Monda Turismo, pri la Katolika E-Tendaro kaj rememoran artikolon pri la elstara slovaka esperantisto Miloslav Rybín (1926-1995). Ni deziru al la gazeto feliĉan ekpaŝon en sian novan historion.

Ni kondolencas

La 7an de aŭgusto forpasis en Torino **Ada Fighiera-Sikorska**, redaktorino de *Heroldo de Esperanto*, Honora Membro de UEA.

Mortis en Kladno, 15.8.1996, 86-jara, s-ano **Ladislav Kynčl**. Li ĝis la lasta tempo estis unu el la trio, kiu, fidela ĉiam al esperanto, ekde la 1930-aj jaroj vivis kune en la E-Klubo en Praha. El ĝi V. Lorenz mortis samaĝe antaŭ tri jaroj, nun la dua, Kynčl, kaj el la trio restas ... mi.

S-ano Kynčl, ĝardenisto kaj poste fabrika laboristo, gvidis kursojn de esperanto kaj estis dum du jaroj prezidanto de la Klubo. Eli Urbanová lin danke rememoras en sia (brazila) „Hetajro dancas“ kiel sian instruiston, kiu per esperanto malfermis al ŝi la mondon.

Jar. Mařík
Praha 21.8.96

(La funebran ceremonion en Kladno partoprenis ankaŭ Pragaj geesperantistoj kun florkrono de la klubo, super lia ĉerko parolis la honora prezidanto de EK Praha s-ano J. Mařík)

La 31-an de julio 1996 mortis en Třinec s-anino **Anna Snígonová** (nask. Zychová) en aĝo de 86 jaroj. (J. Bruderová, filino).

En Švihov ĉe Rakovník la 7an de julio 1996 subite mortis s-ano **Miroslav Damašek** en aĝo de 75 jaroj. Li estis tre laborema kaj agema esperantisto en Most kaj poste ankaŭ en Prago, dum

mallonga tempo li estis ĉe komitatano de la Praga Klubo. Kondolencon al lia edzino Marta.

7.7.1996 mortis Ing. Ondřej Macura, komitatano en EK Ostrava-Vitkovice. Li estis esperantisto de siaj studentaj jaroj.
-drkoč-

En Bor ĉe Tachov mortis en sia 62-a jaro la dumviva membro de ĈEA s-ro MUDr. Karel Máca. Antaŭ jaroj li estis kunfondinto de iam vigla Esperanto-klubo en Bor, partoprenis kun familio SET Lančov kaj ankaŭ subtenis la movadon fariĝinte distrikta funkciulo en Tachov.

La 23-an de septembro 1996 mortis en sia 85-a jaro **Emilie Hrdličková**, klubanino de Brno.

La 11-an de septembro 1996 estis kremaciita s-ino **Marie Skařupová**, 83-jara dumviva membrino de ĈEA, kunfondinto de Somera E-Lernejo en Rožnov pod Radhoštěm en la jaroj 1948-1952, tre aktiva en Ostrava-Poruba dum la 40-aj jaroj.

Mal-nekrologo

En Starto 2/96 ni anoncis forpason de MUDr. **Alena Marková** el Aš (la aŭtoron de la sciigo ni ne memoras). Laŭ informo de s-ino Marie Turková el Plzeň la sinjorino doktorino ankoraŭ vivas kun sia patrino en emeritejo. La redakcio petas pardonon.

Aranĝoj de KAVA-PECH por esperantistoj en 1997:

Kiel tradicie, Kongresa kaj Kleriga entrepreno de Petro Ĉrdle, pli konata sub la mallongigo KAVA-PECH (de la ĉeĥa *Kongresová A Vzdělávací Agentura PEira ĈRdleho*) ankaŭ en 1997 proponas siajn servojn al esperantistoj. Jen la plej gravaj internaciaj aranĝoj:

IREM (Internacia Ripozsemajno En Montaro) 1997-03-22/29

Pasintjare ni aranĝis la 37-an IFES, tradician skisemajnon de fervojistoj. Iom netradicie ni envicigis en la skisemajnon ankaŭ turisman programon por neskiantoj, turniron en tabloteniso kaj aliajn aktivadojn. IFES estis sukcesa (kiel ĉiujare) kaj certe estos sukcesa ankaŭ la 37-a IFES, kiu venontjare okazos en Alpoj. Tamen estas klare, ke malmultaj ĉeĥoj veturos tien pro altaj kostoj. Sed ekzistas jam eksterlandanoj, kiuj montris intereson vintre ripozi kaj samtempe esperantumi en Ĉeĥio. Tial ni decidis starti novan tradicion, nome IREM, Internaciajn Ripozsemajnojn en montaroj. Ni ne volas konkurenci al IFES, kiu tradicie okazadas en februaro aŭ komence de marto. Januaro estas por promenantoj tro malvarma kaj la tagoj tro kurtaj, tial ni elektis la finon de marto, kiam ankoraŭ estas sufiĉe da neĝo por skiantoj, sed ankaŭ sufiĉe da suno kaj varmecho por promenantoj. Krom skiado kaj aparta turisma programo por promenantoj ni ĝuos tablotenison, maskobalon, tombolon kun sekva aŭkcio, kvizojn en Esperanto kaj Esperanto-videofilmojn. Konvenas ankaŭ por familioj kun infanoj, por kiuj estos preparita ankaŭ kurso de magiarto. Restas ankoraŭ decidote, ĉu IFER okazos denove en la montaro Jeseníky (hotelo Dlouhé stráně), aŭ por ŝanĝi la lokon ĉifoje en la montaro Jizerské hory.

Flugkaravano al Aŭstralio (UK) kaj Novzelando 1997-07-10/31

La flugkaravano por partopreni la 82-an UK en Adelaide havos la programon turisme interesan ankaŭ por neesperantistoj. Krom Aŭstralio (kie ni vizitos la kongresurbon Adelaide, Sydney kaj Nacian parkon en Blua Montaro) ni flugos al Novzelando por ekkoni belajn urbojn Wellington kaj Auckland, sed nepre ankaŭ „la plej ĉarman lokon en la mondo“ Rotorua. La riĉa programo estos ankaŭ iom kosta. La antaŭvidita prezo ĉirkaŭ 100.000,- ĉeĥaj kronoj. Partoprenontoj povas pagi la UK-kongreskotizon al UEA pere de ni kun rekompenco en ĉeĥaj kronoj sen alkalkulo de transĝirkostoj.

La 2-a EVI (Esperanto-Videofestivalo Internacia) kun sekva jarŝanĝa renkontiĝo 1997-12-27/1998-01-03

Dum la tagoj inter la 28-a kaj 29-a de decembro okazos la 2-a Esperanto-Videofestivalo Internacia. Krome samloke kaj samtempe okazos kursoj en Esperanto por komencantoj kaj progresintoj (kun speciala celo paroligi studintojn de skribaj kursoj de ĈEA kaj memlernantojn laŭ la lernolibro *Esperantem za tři měsíce*), sed ankaŭ speciala videokurso por infanoj helpe de la furora videofilmo Mazi en Gondolando. Ne mankos gaja Silvestra programo kaj aliaj distraj programeroj. Ĉar ni respektas, ke kelkaj filmamantoj volas havi alian programon por la Silvestro, eblos partopreni aŭ nur la parton de la 27-a ĝis la 30-a de decembro, aŭ male nur de la 30-a de decembro ĝis la 3-a de januaro, kvankam ni supozas, ke plejparto da partoprenantoj venos por la tuta programo.

Pli da informoj kaj aliĝilojn por ĉiuj ĉi aranĝoj vi ricevos ĉe KAVA-PECH, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, telefono: (02) 9912201, fakso (02) 9912126, E-reta adreso (E-mail): chrdle@kava-pech.

Odesílatel:

**Český esperantský svaz
ESPERANTO, p. s. 1069
111 21 Praha 1
☆ STARTO ☆**

**Periodikum Českého esperantského svazu (27. ročník)
Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno
Členská evidence a změny adres: Květa Hubnová, ČES Praha**

**Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (27-a jarkolekto)
Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio
Abonprezo: 15 gld
Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno,
Ĉeĥio**

**Podávání novinových zásilek povoleno
Českou poštou, s. p., Odštěpným závodem Severní Morava,
č. j. 1533/95-P/1 ze dne 3. 8. 1995**

NOVINOVÁ ZÁSILKA

**Poštovné hrazeno v hotovosti
u pošty 746 01 Opava 1**